

## Ĉu Esperantistoj defendu edukadon per la gepatra lingvo?

Depost la jaro 2000, UNESKO oficiale deklaris la 21an de februaro tago de la gepatraj lingvoj. La internacia jaro pri lingvoj, 2008, estis inaŭgurita oficiale la 21an de februaro: la ceremonion mi ĉeestis kaj tie renkontis Ambasadoran Moŝton Olabiyi Yai, ambasadoro de Benino ĉe Unesko kaj nuna prezidanto de la Ekzekutiva Konsilio, kaj Sron Adama Samassekou, prezidanto de Afrika Akademio pri Lingvoj. Universala Esperanto Asocio kontribuis en tiu ĉi internacia jaro pri lingvoj interalie per sia simpozio en Ĝenevo, la 24an de Aprilo, pri lingvaj rajtoj, kaj tiam oni akcentis la rajton ricevi bazan edukadon per sia gepatra lingvo. Sed paralele aŭdiĝis kelkaj voĉoj, laŭ kiuj Esperantistoj jam havas sufiĉe da laboro por promocii Esperanton kaj ne estas sufiĉe fortaj por krome partopreni en defendado de la gepatraj lingvoj. Ĉu ambaŭ celoj malkongruas, kaj ĉu indas, ke Esperantistoj investu energion pri tiu ĉi ekstera temo?

Finfine, ĉu estas katastrofo, ke lingvo mortas? Iasence tio estas natura fenomeno: ĉiutage mortas homoj, ĉiujare mortas lingvoj, tiel estis de jarcentoj kaj ni ne povas artefarite pluvivigi lingvojn pro la simpla fakto, ke ni timas la morton. Eĉ en Francio, ekzistas pluraj dekoj da lokaj lingvoj krom la franca, sed de pli ol du jarcentoj la ŝtato grandparte jam sukcesis malaperigi ilin: ĉu indas plu batali por revivigi lingvojn, kiuj apenaŭ estas gepatraj nuntempe? La vera problemo estas, kiom da lingvoj mortas, kaj kial ili mortas. Se ni ne rezistos, plejmulto el la mondaj lingvoj mortos ĝis la fino de la jarcento, kaŭzante evidentan malriĉiĝon de la homara kulturo. Ne estas same, se homo mortas pro maljuneco aŭ pro atombombo. La 24an de aprilo, UEA-simpozio en Ĝenevo invitis Tove Skutnabb-Kangas (Universitato de Roskilde), prelegi pri: « lingvo, edukado kaj (mal)respekto de la homaj rajtoj », kaj ŝi akcentis, ke 90% ĝis 95% el la gepatraj lingvoj estas minacataj ĝis 2100, laŭ sociologia kaj edukada vidpunktoj. Al sia libro publikigita en 2000 ŝi donis titolon: *Linguistic genocide in education or worldwide diversity and human rights?* “lingva genocido en edukado aŭ tutmonda diverseco kaj homaj rajtoj?”.

Fakte multnombro de lingvoj rezultigas grandajn kostojn, kaj rilate tradukadon kaj rilate instruadon. Ja homaj rajtoj ĝenerale estas kostaj, sed tiajn kostojn oni nepre ne ŝparu: la socio devas provizi al ĉiu homo la bazajn vivkondiĉojn eĉ se tio kostas, t.e. ne nur akvon kaj elektron, sed sanon kaj instruadon. Milito pli kostas ol tio: oni multe tro investas en militoj, kaj ne sufiĉe konscias, ke respekto de homaj rajtoj estas nepre kondiĉo de paco, justeco kaj prospero. Riĉeco ne troviĝas nur en kofroj de bankoj: kultura diverseco estas grandega riĉeco, kiu ja valoras, ke oni elspezu iom da mono.

Same kiel estas science pruvite, ke la plej bona nutraĵo por ĵusnaskito estas la lakto de la propra patrino, same la plej bona edukado por infanoj estas per la gepatra lingvo: post funda esplorado pri la temo, Tove Skutnabb-Kangas rekomendas la rajton je ĉefa gepatra edukado en senpagaj ŝtataj lernejoj dum minimume la ok unuaj lernojaroj. Sed tio levas diversajn demandojn depende de la lokaj cirkonstancoj. La valoro de la lingvo en la socio devas kongrui kun ties rolo en edukado. En Barato, gepatroj preferas, ke iliaj infanoj lernu en lingvo, kiu ebligas al ili trovi oficon poste; sed tiel ili hontas pri la propra lingvo, kaj jen unua paŝo al ĝia morto. Eĉ fortaj lingvoj kiel la franca fariĝas minacataj, kiam ministro publike agnoskas, ke la angla ne plu estas fremda lingvo en Francio.

La plej bona edukado principe estas tiu, kiu plej kongruas kun la socia strukturo. Ekde la jaro 2000, internacia enketo PISA de OCDE celas kompari la eduknivelon de 15-

jaruloj en multaj landoj. Finnlando atingas mirigan rezulton: konstatindas, ke tie regas aparta harmonio inter la socia kaj la lerneja sistemoj. Lernejo ne aspektu fremda mondo aŭ eĉ karcero; interalie infanoj rajtu paroli en la lernejo sian hejman lingvon. En Francio, per ŝildoj kiel: « estas malpermesite kraĉi kaj paroli la bretonan », oni preskaŭ sukcesis, antaŭ du jarcentoj, mortigi la lokajn lingvojn. Kaj nun, defendantoj de la franca lingvo daŭre kontraŭas la ratifon de la eŭropa ĉarto pri minoritataj lingvoj, ĉar ili timas, ke agnoski rajton uzi sian privatan lingvon en publikaj cirkonstancoj (tribunalo ekzemple) endanĝerigus la unuecon de la ŝtato.

Esperantistoj ne apogu tian diskriminacion, laŭ kiu multaj lingvoj rajtas pluvivi nur kaŝe, hejme kaj ne en tribunaloj kaj lernejoj. Parolantoj de tiuj lingvoj devus ĉu konsenti esti duarangaj homoj, ĉu rezigni sian propran lingvon por adopti la loke hegemonian. Kial ne adopti tuj la monde hegemonian lingvon? Precize kontraŭ tio ĉi ni batalas!

Ĉar hegemonia lingvo ne povas anstataŭi la milojn da aliaj... Monda kultura heredaĵo ne konsistas nur en tio, kion oni esprimas en kelkaj plej oficialaj lingvoj: kiel atentigas Tove Skutnabb-Kangas, malapero de lingvoj nepre rezultigos malapero de scioj pri la maniero plu teni la biodiversecon de la tero (kies plimulto estas kodigita nur en la malgrandaj indiĝenaj kaj lokaj lingvoj). « Min mirigas homoj, kiuj deziras “koni” la universon, dum estas jam sufiĉe malfacile trovi sian vojon en urba kvartalo China Town », diris Woody Allen.

Parolantoj de plej fortaj lingvoj ne posedas la tutan mondan kulturon. Ĉiu homgrupo havas sian propran kulturon kaj rajtas komuniki ĝin al la cetera homaro. Naskiĝis en 2001 nova speco de enciklopedio, Vikipedio, en kiu verkas ne nur kelkaj specialistoj dungitaj pro sia aparta kapablo, sed ĉiu ajn homo, kiu volas diskonigi sian pecon de la monda sciaro. Kaj ankaŭ en komputiko disvastiĝas la liberaj programoj, verkitaj ne de fermitaj firmaoj ĉion sciantaj, sed de disaj programistoj kapablaj adapti ilin al ĉies bezonoj.

Sed por valorigi tian distribuitan kulturon, necesas komunikilo. Lingvo ne estas kulturo: la nuna monda uzado de la angla lingvo ne signifas, ke la angla kulturo estas tutmonde konata. La *Komuna Eŭropa Referenckadro pri lingvoj* prilaborata de Konsilio de Eŭropo (2001) ebligas pritaksi la lingvan konon de lernantoj sendepende de iliaj kulturaj konoj. Kaj Esperanto rolu kiel laŭparolilo, kiu ebligas al ĉiuj kulturoj disaŭdigi sin tra la tuta mondo.

Same kiel la egalrajteco de ĉiu ajn lingvo estas principo, kiun oni devas adapti al ĉiuj cirkonstancoj, la rajto ricevi edukadon en la gepatra lingvo estas grava principo, kiun oni kiel eble plej apliku laŭ la efektivaj eblecoj. Dum kiom da klasoj lernantoj lernu en sia gepatra lingvo? kio pri alilandanoj?... Esperantistoj evidente ne havas kompletan respondon al ĉiuj ĉi demandoj, kiuj dependas de la loka eduka sistemo. Kaj ne estas nia rolo solvi ĉiujn ĉi specifajn problemojn. Sed estas nia tasko forte defendi la principon, ke ĉiu rajtas ricevi edukadon en la gepatra lingvo. La internacia lingvo Esperanto devas ebligi, ke ĉiu havu saman fierecon paroli sian lingvon. Mi mem proponus, ke inter lernado de la gepatra lingvo kaj lernado de iu ajn fremda lingvo oni enkondukus konsciigon pri lingva diverseco, dum kiu oni atentigus infanojn pri ekzisto de multaj tre malsamaj, sed egalrajtaj, lingvoj, inter kiuj ili mem devos elekti. « Ĉar ne eblas scii ĉiom pri ĉio sciebla, oni sciu iom pri ĉio. Ja preferindas ioma scio pri ĉio ol ĉioma pri io: pli belas universaleco », skribis Blaise Pascal.

Kaj tiel Esperantistoj kontribuos en disvastigo de ĉiuj kulturoj de la mondo, kaj evitos, ke ili estu formanĝitaj de iu hegemonia lingvo. Tiel ankaŭ, ili ekkreas novan kulturon de dialogo, konsciigante, ke la diverseco estas per si mem riĉeco, kondiĉe, ke oni donu al ĝi esprimilon por disaŭdigi sin tra la tuta mondo.

(prelego prezentita dum la ILEI-konferenco en Portonovo, Benino, 2008.)